09.06.08

FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 2 | Aprilo/Junio 2008



Fundstück aus dem Grundstein des Maximilaneums in München:
Das älteste Eisenbahnmodell Deutschlands aus der Baureihe Patentee (Adler)
Mit Gravierung „Blochmann Dresden 1838“
(Abdruck mit freundlicher Genehmigung des Bayerischen Landtags)

Vojaĝimpresoj pri mia vojaĝo al Ŝikago

(Prelego en Esperantogrupo Duisburg)

Ĵus hejmenveninte el Bulgario, la 28-an de novembro 2008, kie mi vizitis kelkajn semajnojn la familion de mia pli juna filo, Alexander, kaj miajn aliajn parencojn kaj amikinojn, atendis min letero de mia pli aĝa filo, Georgi, el Usono, el Ŝikago. Li jam vivas multajn jarojn tie kaj jam ricevis la ŝtatanecon de tiu lando. Georgi laboras en la granda internacia flughaveno O'Hare en Ŝikago, kiu estas la plej granda en la mondo post tiu en Atlanta (Usono).

Per tiu ricevita letero de Georgi, li eĉ sendis al mi flugbileton de Düsseldorf al Ŝikago. Ĝi validis jam unu semajnon post mia alveno el Bulgario. Kion fari? Rolf iom grumblis, sed poste li komprenis, ke estas necese viziti la filon en Ameriko, ĉar ambaŭ ja ne vidis unu la alian kelkajn jarojn. Rolf nun tre helpis min realigi la vojaĝon. (Mi esperis, ke li ne tro ĝuos sian solecon, pro tio ni telefonis ĉiutage.) Tiam li havis la ideon esplori, ĉu en Ŝikago vivas Esperantistoj aŭ ekzistas eĉ Esperantogrupo. Fakte ni trovis en UEA-jarlibro adreson kaj tuj kontaktis.

Estis hazarde, ke la Ŝikaga Esperanto-Societo ĵus preparis „Zamenhof-feston" en ĉina restoracio. La membroj de la grupo ĝojis, ke eventuale venos eksterlanda gasto. La prezidanto de la grupo, Viktor Payuk, tuj invitis min partopreni en tiu festo kaj eĉ proponis fari, se eble, prelegon pri Zamenhof. Rolf en la fora Germanio rapide serĉis kelkajn datojn pri Zamenhof kaj sendis ilin telefone al mi. Mi ankoraŭ aldonis mian scion pri Zamenhof kaj tiel mi povis verki interesan prelegon.

La urba publika trafiko en Usono estas relative ne tiom konata kiel en Germanio. Ĉar Georgi ne posedas aŭtomobilon, nur biciklon, per kiu li kutime veturas al sia laborejo, Viktor Payuk, prezidanto de la Esperanto-societo, akceptis min antaŭ nia loĝejo kaj veturigis min al la renkontejo. La Esperanto-Societo tre varme akceptis min, pro kio mi volonte dankas. Mi ne preterlasis saluti ĝin en la nomo de nia Duisburga Esperantogrupo. Post bona manĝaĵo, la societo faris apartan, tre varian programon por la festo. Ĉiuj membroj estas tre talentaj: S-ro Byron [*Bajron*], blinda Esperantisto, faris klasikan muzikon per gitaro, kaj s-ino Tina Seastrom per flaŭto. Aliaj rakontis ŝercojn aŭ verkis enigmojn. Tiel preskaŭ ĉiu kontribuis al la programo.

La vojaĝo al Usono komenciĝis eĉ en la unua klaso (novgermane *„Business*-klaso") de la flugmaŝino, kie oni tre dorlotis min. Ĉu Georgi jam estiĝis riĉa homo por aĉeti bileton unuaklasan? Certe ne. Kiel dirite, li laboras en flughaveno kaj tial ricevas iom reduktitan bileton, ankaŭ por mi, la patrino. Mi ne scias la anglan lingvon. Tial oni serĉis en la aviadilo stevardinon, kiu regas la germanan. Ŝi informis min, ke en flughaveno Atlanta atendas min iu por akompani min ĝis la envojaĝkontrolo. Post severa kontrolo de miaj dokumentoj kaj pakaĵo (mi eĉ devis demeti miajn ŝuojn kaj iri per nudaj pie-

doj tra la kontrolaparato), mi nun vere estis en Usono. Tiam ni veturis per malgranda buso al alia loko de la flughaveno, kie akceptis min nigrulo por akompani min. La solvo estis Georgi. Li estas zorgema homo kaj tial petis kolegon en la flughaveno Atlanta akcepti min tie. Tiu kolego akompanis min la tutan tempon en la flughaveno Atlanta, por ke mi ne perdiĝu en tiu grandega arealo. Li ankaŭ montris al mi la ĝustan lokon, kie startos la flugmaŝino al Ŝikago. Ĵus alteriĝinta en Ŝikago, Georgi tuj venis en la aviadilon por akcepti min tie per mansigno kaj la vortoj *„Hallo Mama"*. Kolego de li veturigis nin per aŭtomobilo hejmen al la loĝejo de Georgi. La loĝejo situas proksime de la flughaveno kaj troviĝis en moderna, duetaĝa domo. La loĝejo mem konsistas el du ĉambroj, banejo kaj kuirejo, hejtitaj per tre konvena, planka hejtinstalaĵo. Tio bone helpis kontraŭ tiu tre malvarma vetero kaj neĝo. Estas strange, en Ŝikago regis severa vintro, kvankam ĝi situas en la sama latitudo kiel Suditalio.

Vidalvide de la loĝdomo troviĝas relative granda vendejo, kie mi preskaŭ ĉiutage aĉetis necesajn objektojn por la taga bezono. La ofertitaj objektoj, precipe nutraĵo kaj fruktoj, estis parte tre malmultekostaj. Nur pano estas multekosta. Tial multaj familioj mem bakas siajn panojn.

La sekretariino de la Esperanto-Societo, D-ino Gertrude Novak, invitis min kunveturi kun ŝi al la centro de la urbo por montri al mi tieajn vidindaĵojn, kvankam la vetero estis tre malvarma – minus 15° ĝis minus 25°C. En Ŝikago mi travivis veran vintron, kiu ĉirkaŭ Duisburg mankas.

Unu monaton post mia unua partopreno en kunveno de la Esperanto-Societo Ŝikago, okazis la dua. En ĝi mi prelegis pri la Esperantomovado de la fervojistoj en Germanio. Por tio Rolf rapide tradukis malgrandan historion, kiun li iam verkis en la germana lingvo. Mi komencis per la vortoj: „La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn". Tiu prelego tre interesis la ĉeestantojn. Vi povas postlegi ĝin en la monata bulteno „Saluton!" de la Esperanto-Societo de Ŝikago, en la februara numero 2008.

Mia reflugo je la 5-a de februaro al Düsseldorf pasis samagrable kiel la flugo al Usono. Rolf ĝojis, ke li povis ree ĉirkaŭbraki sian „amerikaninon".

Elena Mateeva-Terjung



Bild: Wikipedia

(daŭrigo)

La Kolonja-Mindena fervojo

Prelego de Manfred Retzlaff
(ekstrakto el la retejo „http://de.wikipedia.org/wiki/")

Modeloj estis la pontoj super la Vistulo kaj la Nogato en Orienta Prusujo, kiuj ambaŭ ekfunkciiĝis en 1857 por la prusa orienta fervojo. Temis pri ponto kun latisaj (kradaj) portiloj kun apog-distancoj de 131 kaj 101 metroj. Oni komencis la konstruadon post la fundament-metado fare de la prusa reĝo Frederiko la Kvara je la 3a de Oktobro 1855. Malfermata ĝi estis en 1859 kiel dua ponto trans la Rejnon kune kun paralele konstruita stratponto.



La stacidomo de *Appelhülsen*
ĉe la linio Parizo-Hamburgo
inter *Münster* kaj *Recklinghausen*

La fervoja linio Hamburgo-Parizo

Fine de la sesa jardeko de la 19a jarcento ekestis la plej granda projekto de la Kolonja-Mindena Fervoja Asocio, kiam Prusujo decidis, ke la fervoja linio inter Parizo kaj Hamburgo, planita de franca fervoja asocio, sur germana teritorio estu konstruata kaj funkciigata de germana fervoja asocio. La KMF gajnis en la publika adjudikado de la 550 kilometrojn longa linio kontraŭ la konkuranto de la Rejnlanda Fervoja Asocio. Oni kalkulis por ĝia konstruado investojn de 43 milionoj da taleroj.

Sed la KMF estis postulinta, ke tiu nova linio, kondukonta de *Venlo* tra la urboj *Wesel, Münster* kaj *Osnabrück* al *Bremeno* kaj *Hamburgo*, estu alligita al sia jam ekzistanta linio de Kolonjo al Mindeno. Pro tio debranĉiĝis la nova linio en la urbo *Wanne* kaj estis ekde la 1a de Januaro 1870 iom post iom plukondukata ĝis Hamburgo, ĝis ĝi la 1an de Junio 1874 estis finfarita. Samtempe oni konstruis linion de *Venlo* tra *Wesel* al la urbo *Haltern*, kie ĝi aliĝis al la nova linio al Hamburgo.

Pro la nove konstruenda Rejn-ponto ĉe Wesel, tiutempe la plej longa fervoja ponto en Germanio, prokrastiĝis la pretigo de tiu linio-parto ĝis la 31a de Decembro 1874. Jam dum la planado estis argumentite, ke oni ne atendu rendimenton de tiu linio. Pro tio ne estas mirige, ke la linio-parto *Venlo-Straelen* estis malfunkciigata je iniciato de la Nederlanda Ŝtata Fervojo jam la 3an de Oktobro 1936. Ankaŭ la resta parto de *Straelen* tra *Wesel* al *Haltern* estas nun plejparte ne plu uzata.

Ŝtatigo

La leĝo por ŝtatigo de la Kolonja-Mindena Fervojo estis proklamita je la 20a de Decembro 1879. Tiutempe la prusa ŝtato jam posedis 74 procentojn de la baza kapitalo de la Asocio. La „Reĝa Direkcio de la Kolonja-Mindena Fervojo en Kolonjo", kiu estis fondita por la administrado kaj funkciigado de la fervojo, transprenis la administradon kaj organizadon jam ekde la 1a de Januaro 1879. Je la 23a de Februaro 1881 tiu direkcio estis alinomita al „Reĝa Fervoj-direkcio en Kolonjo dekstraflanka'" (germane: *Königliche Eisenbahn-Direktion zu Köln rechtsrheinisch*). La Kolonja-Mindena Fervoj-Asocio disponis ĉe sia ŝtatigo pri 619 lokomotivoj kaj 17.023 vagonoj. Ĝi organizis fervojan reton 1.108 kilometrojn longan. El tiuj 467 kilometroj estis dutrakaj. La pere de ŝtataj pruntaĵoj financita aĉet-prezo estis 409.326.500 germanaj markoj. Malestigata (likvidata) estis la asocio je la 1a de Januaro 1886.

(daŭrigota)



Mapo kun linioj konstruitaj de la Kolonja-Mindena Fervoj-Asocio

Kalendaro

10.-18.06.2008
30a Ĉebalta Printempo en Milno
Czeslaw Baranowski, 0048 503 417 825

07.-11.07.2008
Biblia Semajno
en Herzberg – la Esperanto-urbo
ICH: 05521-5983, www.ic-herzberg.de

19.-26.07.2008
93a Universala Kongreso en Rotterdam
www.uea.org

28.07.-04.08.2008
Kristana Kongreso en Pribylina, Slovakio
Pavel Polnicky
cea.polnicki@quick.cz

Arbeitstagung in Fulda

La 15-an de marto kunsidis la GEFA-estraro en la episkopa sidejo-urbo Fulda. La 12 estraranoj traktis diversajn asociajn taskojn resp. problemojn, kiel ekz.
- la financan (cetere sufiĉe bonan)situacion
- la enhavon de nia bulteno "FE"
- la rilatojn al IFEF kaj al GEA
- la programon kaj nombron da partoprenantoj de nia(j)jarkunveno(j)
- la varbadon por nia asocio kaj Eo-kursoj kaj ĝenerale la publikajn
- rilatojn kaj kiel vere gravan aferon la aktivecojn de la GEFA-anoj!!

Estimata membraro!
Pri la lasta temo- viaj deziroj kaj aktivecoj - iom pli da ideoj kaj pensoj: Decida kaj plej grava estas, kion vi faras en viaj kluboj aŭ grupoj, kiel vi informas kaj agadas inter viaj geamikoj, gekolegoj, konatuloj kaj ne laste inter viaj familianoj! Ĉu vi partoprenas kaj aktivas en la Ea vivo? Ĉu vi verkas kontribuojn por la publika kaj Eo-gazetaro? Ĉu vi vizitos nian venontan jarkunvenon en la bavara Bad Tölz?
Kritiku, kion ni plibonigu! Laudu, kion vi trovas bone kaj interese!
Tion deziras via GEFA-estraro kaj ties prezidanto Achim Meinel



Die Teilnehmer der GEFA-Arbeitstagung am 15.3.08 in Fulda
(jeweils von links – oben: Würker, Marzahn, Ullmann, Ehrlich, Meinel – unten: Jasmann, Bernhard, Krüger, Lautenbach, Vogelsang, Terjung, Retzlaff)

La sorĉistina multobliga tabelo

Trovebla en "Faust" de J.W.Goethe
(Das Hexen-Einmaleins.)

Du musst verstehn!
Aus eins mach zehn
und zwei lass stehn`
und drei mach gleich,
so bist du reich.

Verlier die vier!
Aus fünf mach sechs,
so sagt die Hex`,
mach sieben und acht,
so ist´s vollbracht:

Und neun ist eins,
und zehn ist keins.
Das ist das Hexen-
Einmaleins.

S-ro Goethe pardonu mian perfortigon:

Vi devas kompreni!
El unu faru dek
kaj du forigu,
kaj tri rondigu
tiel vi estas riĉa.

Perdu la kvar!
El kvin kaj ses,
tiel diris la sorĉistin`,
faru sep kaj ok,
tiel estos plenumita:

Kaj nau estas unu,
kaj dek estas nenio.
Tio estas la sorĉistina
multobligo.

Imagu: Sorĉistinoj jes, ja flugas per balailoj, kiuj funkcias nun per turbopropo. La sorĉistinan multoligan tabelon ili havas memkompreneble en la balaila komputilo.
Kredu tion! Hg

Ĉu vi ŝatas maĉgumon?

Ne? La fervojo ankaŭ ne. Maĉgumo makulas la plankojn de la vagonoj kaj maĉgumaj buloj gluas sub tabloj.
Sed maĉgumo havas kulturhistorion: En Finnlando arkeologoj trovis bulojn el betulrezino, kiu aĝis 5500 jarojn. Ili havas ankoraŭ dentajn premsignojn.
3500 jarojn antaŭ nia erao oni uzis betulrezinon kiel gluaĵo kaj konstatis, ke betulrezino havas antibakterian efikon kontraŭ bŭŝinfektoj. Oni eltrovis, ke 50 jarojn antaŭ nia erao la grekoj maĉis rezinon de sovaĝa pistako. En 1500 la hispanaj konkerantoj konstatis, ke la indiĝenoj en Sudameriko maĉis la rezinon de sapotilarbo.Jam 1600 ili portis la rezinon al Eŭropo. En 1869 komencis la dentisto William Semple en Ohio la amasproduktadon de maĉgumo. Walter Diemer hazarde eltrovis en 1928 la „Bubble Gum", maĉgumon, per kiu oni povas blovi balonetojn. En 1941-45 ricevis la usonaj soldatoj en la ĉiutaga manĝportio „Bubble Gum"-skatoleton. De tiam la tuta mondo deziris maĉi „Bubble Gum".En 1950 aperis la unua sensukera maĉgumo. Oni ofertis en 1996 maĉgumon kiel rimedo kontraŭ fumado. En 2004 Singapuro mildigis la malbonfaman maĉgummaĉan malpermeson. Sed en 2007 oni eltrovis per akvo malsolveblan maĉgumon.

Trovita en intereto de Dieter Hartig

JUBILEOj DE GEEDZOJ HAUPENTHAL

La geedzoj Alois kaj Margot Haupenthal festas en 2008 du rarajn jubileojn: la feran Nupto-feston la 14-an de aprilo kaj la 90-jariĝon de sinjoro Haupenthal la 27-an de julio.

Al geedzoj Haupenthal naskiĝis du filoj (Armin *† 1944), Reinhard (* 1945) kaj unu filino (Birgitta * 1949). Baldau post la dua mond-milito Alois Haupenthal fariĝis fervojisto. Kun Esperanto li konatiĝis en 1959 kaj tuj ligis kontaktojn kun la fervojaj esperantistoj. Jam en 1960 kun sia filino li trapasis lingvo-ekzamenon en Trier (vd. GEFA-Bulteno 1960: 5, p. 7). De tiam li estas membro de GEFA kaj IFEF kaj vizitis multajn jarkunvenojn (tiujn de Saarbrücken kaj Kaiserslautern li mem organizis kiel distriktkomisiito (1979-2000) en la fervoja sociala organizo (BSW) kaj kongresojn (Utrecht, Lugano, Tarragona), ofte kun sia edzino ĉiam favora al la hobio de la edzo.

GEFA kore gratulas al la jubilea paro, kies adreso estas:
Margot und Alois Haupenthal, Brennender-Berg-Str. 28, 66280 Sulzbach.



Schon angemeldet zur Jahresversammlung 10./12.10.08 in Bad Tölz?

Redaktfino por FE 3/2008 estos la 15.08.2008
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel. (06 61) 7 76 27, Fax (06 61) 3 02 96 92, E-Mail: fritzlautenbach@gmx.de
und Horst Jasmann, Otto-Nagel-Str. 10A, 12683 Berlin
Tel/Fax (0 30) 54 42 361